**AVENO # 36 - AGADO de AVE kaj de AVEanoj**

*aktuale 2010-10-01 ghis 2011-05-27*

**--- Agado de AVE: ---**

**Ekologio de la Homo - el teoria vidpunkto** - de Juri Sokolov, tradukita de Tatjana Auderskaja nun trovighas sur www.verduloj.org

**Europa Federacio de la Junaj Verduloj (FYEG): Deklaracio en Esperanto**
www.fyeg.org/main/index.php/about-fyeg#esperanto

**Renkontighoj - parte kun AVE-anoj**

2011-07-18/23, Hamburgo, HoSo, "Hamburgo - mediprotekta ĉefurbo de Eŭropo 2011"
www.esperanto-hamburg.de/hoso

2011-07-23/30 Gresiljono Alternativa semajno: (ekologio, kuracmetodoj, verda turismo).
gresillon.org , Somera programo: gresillon.org/spip.php?rubrique8

2011-07-23/30, Kopenhago, UK de UEA, AVE-kunveno, diskuto pri la amendo-propono de AVE enmeti "Dauripovecon" lau la t.n. Agendo 21 en la UEA-Statutojn. Jen teksto de W. Guenther (EcoMed) kiu klarigas la amendon: (en, eo) www.cultura21.net/category/topics/esperanto/
www.uea.org/kongresoj/uk_2011.html

2011-07-30/08-06, Sarajevo, SAT-Kongreso, AVE kunlaboras kun SAT enkadre de la ekologia frakcio. www.satesperanto.org

2011-09-11/18, Prago & Dobrichovice EKOTUR (ekologia turismo), eble kun oficiala partopreno de AVE – www.kava-pech.cz/ekotur

2011-09, Herzberg/Harco, laborgrupo por la traduko de la informaj tekstoj pri la Naturparko Harco en norda Germanio: ic-herzberg.de/

**2011-09-08/11, Somera Universitato de la Europaj Verduloj** en Frankfurt/Oder & Slubice/Odra - en Germanio kaj Pollando - la tri chefaj plenar-kunsidoj de la VSU 2011 traktos la jenajn temojn:
1. Pliigho de dekstrula populismo - defio por la demokratio.
2. Nova verda konsento - regajneblaj energioj kreas laborlokojn.
3. EU - de ekonomie instigita regado al politika integrigho.
**AVE havos informstandon kaj ni prezentos Esperanton, la EU-Himnon kaj la Paco-afishoj.**
Do, AVE invitas vin renkontighi okaze de la informstando - mi informos pri la dejhor-tempo(j).
Se vi volas aktive partopreni la VSU, bonvolu alighi: www.green-summer-university.eu

Laborgrupo pri lingvopolitiko en EUropo - chijare ne okazos. Tamen jen pri kio temas:
Se estas dezirinde havi EU-identecon, kio estos la rolo de la lingvo ?
Chu Esperanto povus helpi superi lingvo-naciismon ?
Kiu lingvo kaj kiu teksto por la EU-Himno ?

-----

**Agado-Tendaroj - kunagado de esperantistoj ?**

Ronaldo <ro-esp@dds.nl> informis pri la jenaj tendaroj kie li plejparte partoprenos.
Eble vi interesighas ankau partopreni - kaj estus saghe, ke esperantistoj kune agadas:
2011-08-03/07 Antifa-camp Oberhausen (anti-fashista agado) - proksime de Kolonjo (DE).

2011-08-07/14 Klimacamp (Klimata Tendaro), Jaenschwalde,  inter Cottbus kaj Guben.
en orienta Germanio, proksime al Pollando. Temas pri protestoj kontrau la grandskala bruligo de bruna karbo por produkti kurenton: www.lausitzcamp.info

2011-08_26/09-04 Klimata Tendaro, Hambach proksime de Kolonjo.
Tie estas unu el la du grandaj ekspluatoj de bruna karbo en Germanio; por produkti kurenton el ghi, RWE tie kauzas 10% de la germana emisio da CO2. Se vi pripensas partopreni, bonvolu informi AVE-on, por eble komuna agado de esperantistoj: (de) www.klimacamp2011.de/
(en, fr, nl) www.klimaatactiekamp.org
2012-08-01/21 **ecotopia**, prokrastita al 2012, Wiesenburg/Mark, stacidomo: ecotopia2010.org
(se kelkaj esperantistoj partoprenos, ni havos shancon enmeti Esperanton; dankon al Ronaldo)
---

Wolfgang Guenther organizis subpagharon en **Esperanto ene de "Cultura 21"**,
Internacia retejo kiu traktas la kunligitajn temojn de Dauripoveco, Tutmondigho, Kulturo kaj Arto.
www.cultura21.net/eo/esperanto-eo/ekologia-identeco/about-the-esperanto-language
Wolfgang serchas kunlaboranton, kiu emas kunagadi, ke Esperanto restos en tiu internacia agado.
Cultura 21 - ankau estas ligita kun la "eterna" strebado de AVE, ke UEA enmetu en siajn statutojn la koncepton de dauripoveco - kiu ricevis la shildon AGENDO 21 dum la pintokongreso 1992 en Rio kaj rilate la civitanan agadon 1994 en Aalborg (DK) - jen la deklaracio:
(en multaj lingvoj) www.aalborgplus10.dk/default.aspx?m=2&i=307

**--- Kunlaboro kun la Verdaj Partioj en Afriko ---**

Jam en multaj Afrikaj landoj ekzistas Verdaj (au ekologiaj) Partioj, kiuj kunlaboras en la Federacio de la Afrikaj Verdaj Partioj (AGF): (en, fr) www.africangreens.org
Nuntempe mi vidas kelkaj datojn kie AVE-anoj povus partopreni:
2011-06-25/26, Ouagadougou , Burkinafaso, Akademio de la Afrikaj Verduloj

2012-03, Dakaro (Senegalio), Tutmonda Verda Kongreso.  www.globalgreens.org/senegal2012
AVE intencas prezenti la temon lingva justeco pere de Esperanto. Espereble ni trovos AVE-anojn - au lokajn samideanojn - kiuj povos partopreni. AVE kutime partoprenis la Tutmondajn Kongresojn de la Verdaj Partioj (en Canberra 2001 kaj Sao Paulo 2008)

**---- Petoj subskribi al internacia agado ----**

**Ne al la Mortpuno pro samseksemo en Ugando**  (peticio de AVAAZ)
(intertempe 2011-05-26 la leghpropono estis forstrektia - vidu HR)

La Prezidento Museveni de Ugando intencas akcepti leghoproponon kiu enhavas mortpunon pro samseksemo kaj aliaj seksaj orientighoj (krom la kutima). NRO-oj kiuj defendas tian hom-rajton je memelekto de seksa orientigho, ankau estos persekutataj.  La tutmonda politika premo instigis la prezidenton retiri la legh-proponon, sed nun, pro la Jasmeno-Revolucio en tuta Afriko oni opinias, ke neniu rimarkos tion. Jen la ret-aliro al AVAAAZ en multaj lingvoj:
www.avaaz.org/de/uganda_stop_homophobia_petition_2/?cl=1059099621&v=9057

2011-02-20 Bonvolu subteni: **Tobin-Imposton** por socialaj kaj medioprotektaj celoj.
Jen la europa retejo "imposto kontrau malricheco" sendi peticion al la regantoj en EU kaj G20.
(bonvolu elekti taugan lingvon: de, en, es, fr, it, nl)  www.makefinancework.org/startseite/steuer-gegen-armut/
La shtatoj elspezis miliardojn por savi la bankojn. La ne-respondeca spekulado kauzis ekonomian krizon, kiu nun sharghas sur la shultroj de milionoj, kiuj perdis sian laboron kaj ofte ankau monon.
** la Tobin-Imposto (sur financaj transagoj) estas urghe bezonata char:**
1. La financa sektoro pagos justan kontribuon por kovri la kostojn de la krizo.

2. La enspezoj servu por batali la malrichecon kaj protekti la naturan medion kaj la klimaton.
3. Ghi reduktas la ekstreman spekuladon kaj tiel pli stabiligas la financ-sistemon.
Dank al la nuna franca prezidenteco de G20 (la 20 plej fortaj shtatoj) kaj la aktuala debato en Europo la jaro 2011 estas decida por enkonduki tian imposton. Nun estas bona shanco.

**---- Informoj ----**

**Filmetoj pri ekologiaj problemoj** en Esperanto - (organizitaj de la grupo Frejburgo):
ekz-e pri plastajhoj en la akvaroj: www.youtube.com/results?search_query=Verduloj&aq=f
**Ne Nukleigu la Klimaton**
pagharo kreita okaze de la klimata pinto-konferenco en Kopenhago 2009.
en multaj lingvoj - parte ankau en Esperanto.
Kun multaj tutmond-vastaj ret-ligoj al organizoj, NRO-oj kaj partioj, kiuj subtenis tiun agadon.
www.dont-nuke-the-climate.org/spip.php?rubrique4&lang=eo

2011-02-14: **Protestoj - char Irano malliberigadas la liberan kulturon.**
Tutmondaj protestoj kontrau la malliberigo de la iranaj film-faristoj Jafar Panahi kaj Mohammad Rasoulof.
Same kiel en aliaj landoj estas ampleksa informo pri la stulta kaj kruela malakcepto de kritikoj flanke de la eklezia registaro en Irano.
**Bonvolu kunprotesti surbaze de la Homaj Rajtoj** je: www.taz.de/iran
Ghenerala Deklaracio de la Homaj Rajtoj artikolo 19:
(libereco esprimi sian opinion kaj ricevi informojn): www.verduloj.org/homrajt.htm

Artistoj, kultur-laboristoj kaj jhurnalistoj alvokas la iranan justicon abolicii la maljustajn verdiktojn kontrau la film-faristoj Panahi kaj Rasoulof.
La tutlanda germana gazeto "taz.de" aperis en la Verda Koloro, je la 11-a de Februaro 2011. La Verda Koloro estas la esperiga koloro de la resurektoj en la islamaj nordafrikaj landoj kaj Irano.
La gazeto kompreneble ankau raportas pri multaj aliaj nejustaj verdiktoj kaj agresoj kontrau la Homaj Rajtoj flanke de la Irana Sistemo.

**2011-02, Tunizio, Egiptio, Maroko, ktp.**
Finfine la popolo trovis en tiom senesperiga situacio ke pluraj junuloj memmortigis sin per sinbruligo. En ne imagita komuna tut-landa resurekto ili jam sukcesis shanghi la registaron en Tunizio kaj Egiptio kaj montrighis la "la okcidento" ege malrapide subtenis la resurektojn; plejparte char ili (ni) ja tre komforte vivis kun nur unu chefo en chiu lando dume la korupteco chirkau la regantaj familioj elsuchis siajn landojn samkiel kancero.
Ni deziras al ili, ke ili sufiche baldau trovos stabilan demokratan memdecidan registaron - kaj esperas ke ghi estos ne tiom kaptita de la eklezio kiel en Irano.

2011-02-07, **MSF, Dakaro (Senegalio),** Gandiol, mondcivitana teritorio
Kiel enkonduko al la Monda Sociala Forumo en Dakaro, kie grupo da mondcivitanoj (kaj ankau la AVEano Mirejo Grosjean) ĉeestas, la Kampara Komunumo GANDIOL (Senegalio) ĵus deklaris sin « Monda Teritorio ligita al la Monda Komunumo ». La Kampara Komunumo Gandiol entenas 37 vilaĝojn kaj 20.000 enloĝantojn. Ĝi estas la 979a Mondcivitana teritorio.
La « tutmondiĝa » movado de teritorioj komenciĝis en julio 1949 laŭ iniciato de la urbo Cahors (Lot, Francio): www.recim.org/dem/conseil-eo.htm , www.recim.org/dem/tcm-list.htm

Eble, vershajne, ankau vi ricevis plurajn petojn por subskribi peticion, kies celo estas nombri la **personojn kiuj, tra la mondo, parolas Esperanton** ( jarfine 2010: 1.235 - necesus kolekti pli / au formeti la peticion): www.thepetitionsite.com/1/esperanto-parolantoj-en-la-mondo/

La bulteno n-ro **103 de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato** estas havebla je kutima adreso :
www.globidar.org/solidareco/monda_solidareco.htm
en pdf-formato : www.globidar.org/solidareco/ms103-eo.pdf

**Konstantaj manifestacioj „Por la Sendependeco“ antau la sidejo de WHO** (MSO/ Monda Sano-Organizajho) en Ghenevo.
Char evidente MSO kunlaboras kun la IAEO (Internacia Atom-Energia Organizajho) jam ekde 1959-05-28. Tiam MSO signis kontrakton "WHA 12-40" kun IAEO, kiu ligas la manojn de MSO rilate san-problemojn kauze de la atomenergio. Analizo de la projektoj de MSO rilate radioaktivecon montras ke ili ne agas sendepende. La grupo manifestacias por "Sendependa MSO". Se iu el vi interesus partopreni kelkfoje estus tre bone.
(de, en, es, fr) www.independentwho.info/accueil_FR.php

2010-11-23: **Kontrau rasismo - plurlingva slogano sur kamiono:**
La chefo de nia **distrikto Osterode am Harz** s-ro Bernhard Reuter inauguris novan kamionon kun unikaj surskriboj. Temas pri kvarlingva varbado: angla, germana, pola kaj Esperanto kontrau rasismo. La nova kamiono traveturos Europon. Pro la neutraleco kaj vera internacieco oni elektis Esperanton kiel plej okulfrapan lingvon. La distrikta chefo s-ro Reuter emfazis la gravan signal-efikecon.
Osterode am Harz havas la ghemelurbojn Scarborough en Britio kaj Ostroda en Pollando:
Krome la subdistrikto varbas kontrau rasismo per granda german- kaj esperantlingva varbslogan-bendo. Dank al persista kaj amika interlaborado oni pli kaj pli komprenas en nia regiono la gravecon de Esperanto. Samideane salutas Petro, Zsofia kaj la ICH-teamo:
ic-herzberg.de/ esperanto-urbo.de
esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=84293929

2010-11-16 Tlaxcala estas multlingva pagharo, kaj kunlaboras ankau esperantistoj:
**Tradukejo de Tlaxcala** <tradukejo@gmail.com>, (div. lingvoj + eo) www.tlaxcala-int.org
**Informoj de aliaj Esperanto-Organizajhoj:**

2010-10: Nova bulteno de **EEU:** www.gazetejo.org/eo/node/2120

Europaj Valoroj & la proponita teksto de la EU-himno (U. Brocatelli): www.wix.com/dtisljar/europo

**---- Interesaj informoj, sed ne plu aktuala dato ----**

2011-04-22/25, Sizewell (GB) **kontrau-nuklea tendaro**, en memoro al 25-jara "jubileo" de la Chernobil-Katastrofo sur la plaghostrando de regiono suffolk:
stopnuclearpower.blogspot.com/2011/03/sizewell-camp-2011.html

2011-04-25 Germanio, eble en tuta Europo/Mondo: **memor-manifestacioj omaghe al la 25-jarigho de la Chernobil**-Katastrofo: (de) www.ausgestrahlt.de
(de, en, eo, fr, jp, ko, ro - gheneralaj paghoj) vorort.bund.net/suedlicher-oberrhein/index.html

2011-05-08/15, Liberec (CZ), La 63-a IFEF-Kongreso estas malfermitaj al ĉiuj: www.ifef.net
Kaj eble ankau la IFEF-Kongreso (fervojistoj) interesighas AVEanojn, char Verduloj preferas trajnon kiel rimedo kiam eblas:

2011-05-20/22 Printempa Esperanto-Kunveno, PEKo. En bela kastelo, meze de granda arba parko, en Mozet, apud Namuro en Valonio.
Vidu (ekde februaro) www.esperanto-wallonie.be

2011-06-11/16, Karlovo (BG), AEPA Seminario pri Apliko de Esperanto en la Praktika Agado.
Se vi havas interesan tempon, bonvolu anonci ghin je profesoro leonov@rozabg.com

2011-02-26 La asocio **Bure Libera Zono kaj la Reto "Eliri el Nuklea energio "** serĉas propravolajn aktivulojn por plenumi - dum pluraj monatoj - la konstantan deĵoradon ĉe la Domo de

Rezisto kontraŭ la nuklea rubujo de Bure, en la departemento Mozo, en Loreno.

Bure, bela malgranda vilaĝo de la suda MOZO, estis elektita por akcepti la unuan francan lokon de enfosado de nukleaj defalaĵoj. Tunoj da tre radioaktivaj defalaĵoj produktitaj de la franca nuklea industrio ekde pli ol 50 jaroj estas destinataj riĉigi la mozan subgrundon, riĉigante sampaŝe la politikajn decidantojn, hontinde akvumitajn de (tre) malavaraj subvencioj ekde la alveno de la « laboratorio de esploradoj por la enfosado ».

La Domo de la rezisto, lokita ĉe la centro de la vilaĝo Bure, aktuale ricevas grandajn laborojn de renovigo kaj akceptas paralele aktivulojn kaj simpatiantojn de la kontraŭatoma lukto.

Por kontraŭi la fortan propagandon de la laboratorio, estis decidita la konstruo de halo, flanke de la domo, por plurcela-aktivado . Tiu halo  ebligos akcepti kaj informi publikon pli larĝan ol tiun, kiun ni ricevas hodiaŭ, loĝigi ĉiamajn kaj portempajn ekspoziciojn, akcepti la kunvenojn de la regionaj, naciaj kaj internaciaj kolektivoj, ktp.
Nia celo ankaŭ estas daŭrigi la renovigon de la Domo por povi daŭre akcepti, kaj ĉiam en mem-mastrumada maniero, multegon da simpatiantoj kaj aktivuloj de la kontraŭnuklea lukto .

La Domo de Bure loĝigas ĉiujn projektojn proponitajn, se ili kontraŭstaras la nuklean energion kaj/aŭ proponas alternativojn al tiu mortiga (morto-porta ?) energio. En nia regiono tre maldense loĝata , la Domo de rezisto estas nepra ilo de la kontraŭatoma lukto !

En la programo de la konstanta deĵorado:
- mastrumado de la ĉiutaga hejma vivo, kaj akcepto de la bonvoluloj
- partopreno al la administraj  kaj  sekretariaj taskoj de la asocio (iu necesa malbono...)
- kontrolo kaj/aŭ enkadrigo de la  diversaj laboroj de renovigo/konstruado
- organizo de aktivaj kaj informaj agoj en kunlaboro kun la aliaj lokaj kolektivoj

Se vi havas:
- fortan emon por la vivo en komunumo kaj reala plezuro labori teame
- intereson por la laboroj de renovigo/konstruado,
- emon oponi vin al projekto sen vosto nek kapo, kiu oferas la estontecon de la planedo kaj de ĝiaj loĝantoj al la financaj interesoj de superpotenca lobio,
- plurajn monatojn (3 minimume) dediĉeblajn al la kontraŭnuklea lukto

Kiuj ni estas? La asocio Bure Libera Zono animas kaj (re)konstruas la Domon de Rezisto kontraŭ la nuklea rubujo de Bure, tra SCI de kiu ŝi posedas 60% de la partoj, kaj la Reto « Eliri el la Nuklea energio » tenas la 40% restantajn partojn .

BZL(Bure Libera Zono) estas asocio, deklarita en prefektejo, sed kiu ne tute funkcias kiel klasika asocio: ghi estas efektive administrata de franc-germana ofico de 15 kun-prezidantoj. La konstantaj deĵorantoj de la Domo aŭtomate estas parto de la kolektivo (krom se ili ne deziras tion).
BZL estas aliĝita membro de la Reto « Eliri el la Nuklea energio », federacio de asocioj kaj de individuoj kontraŭstarantaj  la nuklean energion, kaj subskribintaj la Ĉarton de la Reto.
BZL havas por celoj:
- promocii alian manieron de organizado (ĉefe tra ĝia institucia funkciado kaj la vivo en la Domo),
- proponi logistikan apogon al diversaj kontraŭatomaj agoj kaj faciligi la laboron de aliaj kolektivoj,
- doni al vasta publiko iun kontraŭ-informon pri la nuklea energio kaj ĝiaj defalaĵoj,
- fariĝi montro-fenestro pri aŭtonomeco kaj renovigeblaj energioj

Antaŭ ol kuniĝi kun ni kaj por esti certa frapi ĉe la taŭga pordo rigardu  la blogon de la asocio!
burezoneblog.over-Blogo.Com/
Por kunigi nin: leherissonvengeur@gmail.Com

------------------ fino de AVENO 36 - Agado (2011-05-27)